# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 4 (883) • 2010 •

DIA REGNO

ISSN 0167-9554




PARTOPRENANTOJ DUM LA KONGRESO EN BEREGDARÓC

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 325 615 651; 💻 cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI ĉe ING Bank N.V.: 5506132. Kontonomo: INT CHR ESPERANTO BOND - KELI - BIC: INGBNL2A; IBAN: NL86INGB0005506132

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec


## ENHAVO


| | |
|---|---|
| Ĉe ili ĉio estis komuna | 75 |
| Inter ili, neniu havis mankon | 81 |
| IKUE-kongreso 2010 – raporteto | 86 |
| Raporto kaj impresoj pri la ĉijara KELI-kongreso | 87 |
| Ŝercoj kolektitaj (4) | 92 |
| Recenzo pri konversacia vortaro | 94 |
| Kristana ferisemajno | 95 |
| Vivi kun Kristo | 96 |


## REDAKTORAJ VORTOJ

Mi salutas vin reen post niaj diversaj someraj ferioj kaj travivaĵoj. Kelkaj el ni kune feriis dum la KELI-kongreso en orienta Hungario. Granda travivaĵo en si mem viziti tiun regionon. Samtempe ankaŭ la ĉiama ĝojo renkonti malnovajn kaj novajn konatulojn. Unu partoprenanto sukcese kaj koncise rakontis pri tiu okazaĵo en sia hejma eklezia gazeto. La artikolon ŝi tradukis al Esperanto kaj vi povas legi ĝin sur paĝo 95. Tiu rakonto estas unu bona ekzemplo kiel ni hejme povas diskonigi pri nia lingvo Esperanto kaj KELI. Ni prenu la eblecojn!

La kunestado kaj la prelegoj instigas almenaŭ min ke mi kaptu la novan laborjaron por studi kaj plibonigi mian lingvoscion.

Kiel kutime vi ĉi-numere trovos pli longan raporton pri la kongreso kun kelkaj fotoj kaj prelegojn prezentatajn dumkongrese. Kvankam mi nun ricevis multajn tekstajn materialojn, kiujn mi iom post iom publikigos, tio ne signifas ke vi ne raportu de via flanko. Mi volonte publikigos.

# Ĉe ili ĉio estis komuna

## Unua enkonduka prelego dum la kongreso en Beregdaróc, 2010

Jacques TUINDER, NL

La perikopo, kiu estas la temo de mia prelego, ĉiam denove min fascinas, kiam mi legas, relegas kaj pripensas ĝin. Jes, mi devas malkaŝe konfesi, ke tiam mi ne povas kredi al miaj oreloj kaj okuloj! Ĉu tamen ekzistis en la apostolaj tagoj bone funkcianta modelo de kristana prakomunismo[1]? Alivorte: ĉu ĉiutaga realeco kaj nekredebla utopio povas samtempe prezentiĝi kaj videbliĝi sur la tero? Jes, efektive, ĉar kiom ofte kaj emfaze ni legas pri Nova Ĉielo kaj Nova Tero anoncitaj en la sanktaj libroj? Aŭ ĉu foje, subite, dummomente povas aperi inter ni La Regno de Dio, kies alvenon ni preĝante seninterrompe elpetas? Aŭ ĉu temas pri la Sankta Spirito, kiu en iu ajn temp-ero plenumas sian promeson pri Lando Promesita, kie la Plejaltulo kiel bona ŝafisto konkrete spertigas, ke *"ni mankon ne havos"*? (Psa.23,1). Ĉu vi serĉas bonan ekzemplon de mirindaĵo aŭ miraklo? Jen vi havas!

> ĉu ĉiutaga realeco kaj nekredebla utopio povas samtempe prezentiĝi kaj videbliĝi sur la tero?

Antaŭ ĉio ni forte konsciigu al ni, ke la aŭtoro enkondukas la unuan libron de sia duvoluma verko per grava rimarko: li esploris ĉion atente de la komenco kaj li skribas en ordo, por ke la leganto (la plej eminenta Teofilo) povu scii la

---

Agoj 4, 32-35

La amaso de la fiduloj estis unukora kaj unuanima kaj neniu el ili nomis ion el siaj posedaĵoj sia propraĵo, sed **ĉe ili ĉio estis komuna.** Kun granda potenco la apostoloj faris atestaĵon pri la releviĝo de la Sinjoro Jesuo, kaj granda graco estis sur ili ĉiuj. **Neniu inter ili ja havis mankon,** ĉar ĉiuj posedantoj de terpecoj aŭ domoj vendis ilin, alportis la enspezojn de la venditaĵoj, kaj metis tion antau la piedoj de la apostoloj. Oni disdonis al ĉiuj, laŭ tio kion ĉiu bezonis.

Laŭ la traduko de Gerrit Berveling. (Flanke de Jesuo. La Nova Testamento. vol.3). La saman tekston laŭ la kutima traduko vi trovas sur paĝo 81.

certecon pri la aferoj, pri kiuj li estas instruita (Luk.1,3-4). Tiujn pripensindajn vortojn, tiun garantion, ni daŭre havu en la memoro! Resume, Luko estas serioza kaj fidinda verkisto!

Karaj gefratoj, ĉe ni – dum ni estas hejme aŭ kongresas – ne ĉio estas komuna, sed almenaŭ la lingvo Esperanto; ĝi nun firme ligas nin kaj vokis nin al nia ĉiujara KELI-konferenco. Kaj al neniu mi bezonas klarigi, ke por la aŭtoro d-ro Zamenhof kun lia lingvo nedisigeble estas ligita io profunda, io humana, io esenca, *la interna ideo*. Ho, kiom privilegiitaj kaj benataj ni estas pro tio, ke ni lernis Esperanton, por ni ankaŭ la ekumena lingvo!

> ĉiumaniere la aŭtoro intencas montri kaj pruvi al la legantoj, ke la laboro de la Sankta Spirito estas fekunda kaj sukcesa

Interese estas, ke la lingvo, en kiu la Nova Testamento nin atingis – do ankaŭ la Evangelio laŭ Luko kaj la Agoj de la Apostoloj – estas la Greka aŭ Helena, sed sub la dialekta formo *Koinę* (t.e. komuna). La unuaj legantoj do povis konatiĝi kun la duatestamentaj skribaĵoj en lingvo, kiu nomiĝis kaj fakte estis al ili komuna. Ili parolis tiun lingvon en la ĉiutaga vivo, kiel ni la Lingvon de Espero inter esperantistoj.

En sia unua libro Luko priskribas *"ĉion, kion Jesuo komencis fari kaj instrui, ĝis la tago, kiam li estis akceptita supren, doninte ordonon per la Sankta Spirito al la apostoloj, kiujn li elektis"* (Ago.1,1-2). Jesuo estis admoninta siajn apostolojn ne forlasi Jerusalemon, sed atendi la promeson de la Patro, t.e. ke ili baptiĝos per la Sankta Spirito. Jes, ili ricevos tre specialan povon, kiam la Sankta Spirito venos sur ilin, por fari ilin atestantoj de Jesuo kaj lia releviĝo.

Kaj ni ĉiuj scias, kiel okazis la Pentekosta Festo, en kiu spektakle manifestiĝis la Sankta Spirito, kiam *"ili ĉiuj estis unuanime en unu loko"* (2,1). Ni legas, ke la ĉeestantaj homoj "*miregis, ĉar ĉiu aparte aŭdis ilin paroli per la propra dialekto"* (2,6). Kaj kion ili aŭdis? Nu, *"la mirindaĵojn de Dio"* (2,11). Kaj la dua libro de Luko estas plena de signoj kaj mirindaĵoj kaj mirakloj... ĉiumaniere la aŭtoro intencas montri kaj pruvi al la legantoj, ke la laboro de la Sankta Spirito estas fekunda kaj sukcesa. Kvante kaj kvalite. Li ŝatas mencii, kiom da homoj – eĉ milope – aliĝis al la ade kreskanta komunumo de novkristanoj (ekz.2,41 kaj 4,4).

Mi ŝatas nomi la libron *Agoj de la Apostoloj* prefere *Agoj de la Sankta Spirito*. Kial? Ĉar Luko priskribas kiel la Sankta Spirito pere de la predikado de la apostoloj transformas la unuajn aŭskultantojn al homoj liberaj, konvertitaj, homoj kiuj konvinke ekkredis kaj draste ŝanĝis sian vivopatronon, venis al nova konduto, fariĝis Mesianoj. La titolo de la libro povus esti ankaŭ; *Agoj de la Unuaj Kristanoj...*

Kaj kio estis la 'sukcesformulo', se

oni permesas al mi tion tiel diri? Kiom ofte nia kara enĉiela Honora Prezidanto Adolf Burkhardt nin dum kongresoj rondkantigis:

*Kaj ili firme persistis en apostolinstruo*
*kaj en kunuleco kaj en preĝ'*
*kaj en divido de unu pan'*

(Adoru 568).

Jen sufiĉe da elementoj por alporti temojn minimume por kvar prelegoj!

Unualoke, ni ade kaj ade aŭdas predikojn de instruantaj kaj eksplikantaj apostoloj. Tio, la mesaĝo pri Jesuo releviĝinta, estis la bazo por varbi novajn adeptojn. Kaj tio sub inspiro kaj instigo de la Spirito! Tiuj predikoj estis tiom invitaj kaj altiraj, ke la aŭskultantoj *"estis pikitaj en la koro"*. Ili diris al Petro kaj la aliaj apostoloj: *"kion ni faru, fratoj?"* (2,37). Jen demando de ĉiuj tempoj kaj de ĉiuj lokoj! Ĝi estas ankaŭ nia demando en la hodiaŭa tago! La respondo de Petro estas konata: *"Ekpentu, konvertiĝu, ŝanĝu vian menson kaj vian vivomanieron, baptiĝu, forviŝiĝu viaj pekoj kaj ricevu la donacon de la Sankta Spirito"* (2,38). ĉiam denove estas mencio pri la Sankta Spirito, la Granda Konsolanto kaj Admonanto, kiu – renovigante homojn – re-nov-igas la fizionomion de la tero. Tio okazas ankaŭ tre konkrete en nia perikopo. Per signoj kaj mirakloj. Per la nomo de Jesuo. Antaŭ ol Luko komencis raporti pri unu el la multaj mirakloj, okazis predikado kaj preĝado, kio rezultigis tion, ke skuiĝis la loko, en kiu ili kolektiĝis; *"kaj ili ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito kaj parolis kuraĝe la vorton de Dio"* (4,31). Kial skuiĝis la loko, demando nepre respondenda, demando ege fascina. Mi klopodos respondi.

la Sankta Spirito, la Granda Konsolanto kaj Admonanto, kiu – renovigante homojn – re-nov-igas la fizionomion de la tero.

Mi deziras ĉi tie emfazi la gravan verbon pleniĝi, ĉar ĝian radikon ni retrovas en la vorto kiun nia traduko redonas per anaro kaj la nova nederlanda biblio-eldono mistrafe per grupo. Ne, temas pri ŝatata vorto de Luko, kiun oni 25-foje retrovas en liaj libroj. En la originala vorto *plęthos* oni aŭdas la adjektivon *plęręs* (plena), ankaŭ ofta ĉe Luko, ekz. rilate al Jesuo, kiu estis 'plena de la Sankta Spirito' (Luk.4,1). Kaj al Stefano, kiu estis viro plena de fido kaj de la Sankta Spirito (6,5; kp.7,55, 11.24).

Skuiĝis la loko. Kaj tio povus signifi ke la tero metamorfoziĝis, ricevis alian karakteron, fariĝis 'tero sub la ĉielo' laŭ Dia plano. Ne ŝanĝiĝis la loko, sed la homoj sur la loko. Skuiĝis metafore, sed plene aliiĝis ilia praktika vivostilo. Ŝanĝiĝis egoismo en altruismon. ŝanĝiĝis homoj en kunhomojn, en verajn anojn de Mesio Jesuo.

Luko volas vidigi kaj kredigi nin, ke la instruado de la apostoloj gvidis al amaso da konvertiĝoj. Ne temis pri 'plenmano', sed male pri ' *plęthos* ', t.e.

'plennombro'. Plena, ankaŭ en tiu senco, ke ĉiuj post preĝado, baptiĝo kaj pekoforviŝiĝo, estis plenaj de la Sankta Spirito, kiu paroligis ilin kuraĝe la Vorton de Dio.

Ĉi tie ni trovas kune kvar bibliajn kernvortojn:

1) la Loko (t.e. tero-sub-la-ĉielo),
2) la Nomo (la nomo de Jesuo releviĝinta),
3) la Vorto, kiun homoj aŭdis kaj akceptis, kaj
4) la Tago (la ĉiama Hodiaŭo de la Skribo). La Tago, en kiu plennombro kolektiĝas. Tago sabatkaraktera.

Kaj kio okazis en tiu 'Nuna Tago'. Ni nepre kredu al Luko: la plennombro de la kredantoj estis unukora kaj unuanima. La fideluloj plene respondis al la kordeziro de Jesuo, kiam Li preĝis: *"Patro Sankta, gardu en Via nomo tiujn, kiujn Vi donis al mi, por ke ili estu unu tiel same kiel ni"* (Joh.17,11; kp 17.22). Regis en tiu tago plena konkordo, sankta harmonio, korvarmiga gefrateco. Tia ja devas esti la komunumo de Jesuo-disĉiploj! *"Neniu diris, ke io el lia havaĵo estas propra al li, sed ĉe ili ĉio estis komuna"* (4,32). En tiu tago okazis miraklo, danke al la elverŝiĝo de la Sankta Spirito. *"Granda graco estis sur ĉiuj ili"* (4,33). Kaj tial oni neniel trompu tiun Sanktan Spiriton, kiel faris Ananias kaj Sapfira, kies fatalan vivofinon ni konas (ĉap.5).

Ĉirkaŭ la vivotablo ili sidiĝis, miloj kaj miloj, kunuloj kun kunulinoj, kun Kunulo Jesuo releviĝinta. Kaj ĉiuj teleroj estis plenaj. Al la nova vivostilo apartenis ĉiutaga vizito al la templo, en unuanimeco. Sed hejme ili dividis sian panon kun ĝojo kaj unueco de koro, laŭdante Dion (2,43-47). En tiu sama dua ĉapitro ni legas ke *"multaj mirakloj fariĝis per la apostoloj. Kaj ĉiuj kredantoj estis kune kaj havis ĉion komuna. Kaj ili vendis siajn havojn kaj posedaĵojn, kaj dividis ilin al ĉiuj laŭ ĉies aparta bezono"* (2,43-45). Jen, unua mencio de bonega kristana vivopraktiko.

> Ni nepre kredu al Luko: la plennombro de la kredantoj estis unukora kaj unuanima.

*"Inter ili neniu havis mankon"* (4,34). En la originala ni legas grekan vorton kiun ni trovas nur ĉi tie: "ĉar" – tiu vorteto mankas en nia traduko – estas ekspliko de "*granda graco estis sur ĉiuj ili". "Estis neniu bezonanto inter ili"* (4,34). Ili dividis sian panon, sian ekziston, sian hodiaŭon kaj morgaŭon, kaj tiel preludis tute novan tempon, mi diru paradizan aŭ ĉielan. Rabeno Aleksandro diris: *"Ke la ĉielo estu ĉiela, jen la zorgo de Dio mem. Nia zorgo estas, ke ankaŭ la tero fariĝu ĉiela"* (Siach Sarfe Kodesh I, 99).

Imagu, kiel 'plennombro' da homoj aliĝas kun la 'rikolto' de ĉiaj venditaĵoj, bienoj kaj domoj. kampoj kaj arbaroj. Kaj antaŭ la apostolaj piedoj troviĝis kesto aŭ telero, kiu pleniĝis de moneroj kaj bankbiletoj. Bedaŭrinde la nova nederlanda traduko forigis la piedojn, opiniante ke la homoj 'enmanigis' la

monon. Nu, mi estas certa ke la apostoloj tute ne tuŝis la monon per siaj manoj! Ili ne prenis sed ricevis por komuna uzado. Temas certe pri esprimiĝo de honoro kaj respekto al la apostoloj, kiujn Jesuo mem dum sia surtera vivo estis elektinta. Neniu poste havis privatan posedaĵon, same kiel tio okazas en monaĥejoj, kie monaĥo en libro skribas *'ad usum fratris Petri'*, t.e. ĉi tiun libron ne posedas sed uzas frato Petro.

En la fino de nia perikopo estas mencio pri Jozefo, alnomita Barnabas, t.e. Filo de Konsolo. Sed la leganto pensu ankaŭ pri tiu alia Jozefo, kiu zorgis pri bezonantoj en propra kaj ĉirkaŭaj landoj kiam tie regis malsato dum sep plenaj jaroj. Li sukcesis en tio nur danke al severa reĝimo, deviga ŝtatordo, konsekvenca strategio kaj pripensita regularo de ŝparado en stokejoj dum la sep jaroj de abundo. Ankaŭ formo de biblia prakomunismo[1]!

ĉu Luko priskribas idealon, revon, vizion aŭ ĉu la Sankta Spirito en tiu loko kaj en tiu tempo vere kapablis funde rekrei homojn laŭ la bildo de Dio?

Unu demando estas: ĉu Luko priskribas idealon, revon, vizion aŭ ĉu la Sankta Spirito en tiu loko kaj en tiu tempo vere kapablis funde rekrei homojn laŭ la bildo de Dio? Alia demando: kial tiu patrono – ekster monaĥejoj – neniam fariĝis normala kaj norma por kristana komunumo? Tria demando: kial la verdikto pri Ananias kaj Sapfira, kiuj iom retenis el la 'rikolto' de venditaĵoj kaj do mensogis al la Sankta Spirito, estis tiom senelire definitiva, tiom ekstreme severa, tiom nehumane rigora'?

En nia ekumena bazogrupo jam dum dekoj da jaroj ni havas belegan tradicion, kiu klopodas iomete proksimiĝi al tiu prakomunumo, ĉe kies anoj ĉio estis komuna kaj kie mankis bezonantoj. En la monato junio individuaj kaj familiaj membroj kolektiĝas ĉirkaŭ tabloj por kune dividi kunportitajn panon, fruktojn kaj trinkaĵojn. ĉiu havas ion ĉe si kio povas kontribui al la manĝo, kiu havas la karakteron de 'agapeo'. La salono plenas de floroj kaj plantoj. Ĉiu transdonas koverton en kiu troviĝas tri procentoj de la jaraj enspezoj. Ĉar ni ne havas 'apostolojn', ni ne povas meti tiun monon antaŭ iliaj piedoj, sed kompreneble prezentiĝas aliaj bonaj solvoj! Kelke da kunhelpantoj amasigas (*plęthos*!) ĉiujn monsumojn kaj dividas la tuton per la nombro de partoprenantoj. Poste al ĉiu oni enmanigas koverton kun sama enhavo. Kelkaj ricevas pli, kelkaj malpli, sed senescepte ĉiuj sentas sin 'riĉuloj', ĉar por momento ne estas bezonantoj en nia rondo. Menciinde estas, ke ĉiujare simbole partoprenas ankaŭ homoj en malriĉaj landoj kun kiuj ni havas kontakton kaj kiuj suferas grandan mankon. Ankaŭ tiuj nevideblaj gastoj – unu, eĉ esperantiston, mi konas persone pro miaj E-vid-ent-e-misioj - spirite ĉeestas, kaj ili spertas de granda distanco, ke kristana

komunumo disdonas al ili 'laŭ ĉies aparta bezono'. Tiun manĝon ni ŝatas nomi Ni-redividu-Festo. Ni preĝas kaj kantas kaj aŭdas belajn rakontojn, kiuj etose helpas pli profunde kompreni la ideon de intergefratiĝo, komenciĝanta ĉirkaŭ tablo sur kiu ne estas malplenaj teleroj. Ni rompas inter ni la panon kaj praktikas reciprokajn solidarecon kaj komunecon. Realeco kaj utopio tiuvespere kvazaŭ samtempas... Nepre tio povas esti maniero por sanktigi la Unikan Nomon!

Karaj gefratoj, laŭ mia sperto la mondo-tablo estas la Loko kie ni, adorantoj de la Nomo kaj praktikantoj de la Vorto, konstatas ke en ĉi tiu Tago ekzistas havantoj kaj nehavantoj. Kie ni konvinkiĝas pri malsame provizitaj teleroj: plenaj, duonplenaj kaj malplenaj teleroj. La tablo estas la plej bona loko, kie ni povas trejni kaj praktiki la intergefratiĝon de la homoj[2]. Nelaste la tablo estas la loko de renkontiĝo, pardonado kaj repaciĝo. La loko kiu faras la vivon Sabato!

En la tempo kiam Jozefo subreĝis en Egiptio sekvis periodon de abundo periodo de malsato. Male en nia tempo kiam paralelas teropartoj kun superplenaj pladoj kaj aliaj teropartoj kie al senenhavaj pladoj devas rigardi malsatantoj, kiuj morgaŭ aŭ postmorgaŭ ne plu bezonas malsati... Ĉu estas hazardo ke kristanoj ĝenerale loĝas en 'favora' duono de la tero? Kaj se jes, ĉu tio povus prezenti bonvenan eblecon al ili 'favorigi' – per 'kristana prakomunismo'[1] – mal-proksimajn 'proksimulojn', forajn gefratojn, kiuj havas mankon?

Mi finas mian prelegon, rimarkigante ke la konferenca temo al mi ege plaĉas. Mi tial esprimas la esperon kaj la deziron ke nia malgranda kongresanta KELI-familio – ne 'plennombro' sed almenaŭ 'plenmano' – preĝante primeditu kaj eksperimente serĉu modestajn vojojn al pli da komun-eco, parenca al tiu de la prakristanoj! Ke la Sankta Spirito, la apostola instruo, komuna preĝado, ekumenaj interparoloj, gefrateco kaj kunuleco, danke ankaŭ al nia komuna lingvo Esperanto, gvidu nin en niaj klopodoj!

Dankon

(1) Bone komprenu: hezite uzante la vorton prakomunismo, mi deziras nemiskomprenige emfazi, ke mi neniel celas al ideologio kaj sistemo, kiuj dum dekoj da jaroj terure subpremis milionojn da homoj. Temas nur pri nepre biblia (t.e. apostola) instruado!

(2) En mia lingvo socio estas vorto kiu havas siajn etimologiajn radikojn en la verbo manĝi. Membro de la socio estas, por tiel diri, kunmanĝanto, samtablano!

[rimarko de la redaktoro: Pro malsano nia frato Jacques Tuinder ne povis mem prelegi dum la kongreso, sed sendis sian jam preparitan tekston al Siegfried Krüger kiu laŭtlegis ĝin]

# “Inter ili, neniu havis mankon”

## Dua enkonduka prelego dum la kongreso en Beregdaróc 2010

Philippe COUSSON, FR

Inter ili, neniu havis mankon, tiel tekstas la moto de la kongreso, laŭ la versiklo 34 de la 4-a ĉapitro de la Agoj de la Apostoloj.

Mi relegos la tutan perikopon, de la versiklo 32:

*Kaj la anaro de la kredantoj estis unukora kaj unuanima, kaj neniu diris, ke io el lia havaĵo estas propra al li; sed ĉe ili ĉio estis komuna. Kaj kun granda potenco la apostoloj atestis pri la releviĝo de la Sinjoro Jesuo; kaj granda graco estis sur ĉiuj. Inter ili neniu havis mankon, ĉar ĉiuj posedantoj de bienoj aŭ domoj vendis ilin, kaj alportis la prezon de la venditaĵoj kaj metis ĝin antaŭ la piedoj de la apostoloj; kaj estis disdonate al ĉiu laŭ ĉies aparta bezono.*

Fakte, tiu teksto rememorigas al ni versiklojn el la fino de la 2-a ĉapitro:

*Tiuj do, kiuj akceptis lian parolon, baptiĝis, kaj en tiu tago aldoniĝis ĉirkaŭ tri mil animoj. Kaj ili persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj. Kaj ĉiu animo havis timon, kaj multaj mirakloj kaj signoj fariĝis per la apostoloj. Kaj ĉiuj kredantoj estis kune, kaj havis ĉion komuna; kaj ili vendis siajn havojn kaj posedaĵojn, kaj dividis ilin al ĉiuj laŭ ĉies aparta bezono. Kaj ĉiutage, vizitadante unuanime la templon, kaj dispecigante panon dome, ili prenis sian nutraĵon kun ĝojo kaj unueco de koro, laŭdante Dion kaj havante favoron ĉe la tuta popolo. Kaj la Sinjoro aldonis ĉiutage al la eklezio la savatojn.*

Tiuj versikloj priskribas la unuan kristanan komunumon en Jerusalem, aŭ almenaŭ la ideon, kiun havis la atestantoj kaj kiun raportis Luko. Kio okazis do tiutempe?

Post Pentekosto kaj la disverŝo de la Spirito super la disĉiploj, multaj homoj estis konvinkitaj kaj fariĝis kredantoj. Rigardo al la parolado de Petro raportita de Luko povas indiki kion ili vivas kaj atendas. Por klarigi al homamaso la fenomenon de la profetantaj disĉiploj, Petro citas Joel, kiu parolas pri la lasta



Philippe Cousson. Fotis: Wil van Ganswijk

tempo, prezentis Jesuon kiel Kriston, do la promesitan Mesion. Se oni rigardas al la vortoj de la anĝelo post la ĉieleniro, versiklo 11 de la 1-a ĉapitro: ĉi tiu Jesuo, kiu estas prenita supren for de vi en la ĉielon, tiel same revenos, kiel vi vidis lin iranta en la ĉielon.

La konsekvenco de tio estas ke la disĉiploj atendis la finon por baldaŭ. Ili vivis la momenton, ĉar baldaŭ, tre baldaŭ venos la fino, kaj la venko de la Mesio.

Alia elemento estas ke la nombro de la disĉiploj kreskis.

La havaĵoj, kiuj tradicie reprezentas sekurecon por la estonteco, valoras ĉi tiam nenion, ĉar la estonteco estos la fino. Do plej bone uzi ĝin por la malhavantoj inter ili.

Oni krome devas noti, ke tia donaco neniel estis deviga. Kion oni riproĉis al Ananias kaj Sapfira, en la sekvanta ĉapitro, ne estas ke ili retenis parton, sed ke ili mensogis. Barnabas vendis kampon kaj donis la monon, sed oni povas supozi ke li posedis aliajn.

La havaĵoj, kiuj tradicie reprezentas sekurecon por la estonteco, valoras ĉi tiam nenion, ĉar la estonteco estos la fino.

Fakte, ili ĉiuj vivis en komuneco, ne ke ili ne plu posedis ion, sed la havantoj dividis kun la ne-havantoj, tiel ke neniu havis mankon, aŭ pli ĝuste ne troviĝis inter ili bezonulo, ĉar la aliaj dividis kun tiu sian havaĵon.

Mi volas lasi al vi unu rimarkon : tiu komuneco kaj dividemo estis vivata inter la kredantoj, kaj ne celis eksteren tiutempe.

Kiel mi jam menciis, unu el la eblaj kialoj de tiu sinteno estas ke ili atendis la revenon de Jesuo. Post unu generacio, ĉar la reveno prokrastiĝis, la sinteno ŝanĝiĝis. Tamen la solidareco inter la kristanoj restis. Simple ni rememoru la alvokon de Paŭlo por monkolekto por la Eklezio de Jerusalem. Eble, ili ĉion foruzis.

Simpla kroma rimarko: kelkajn jarojn poste, la urbo Jerusalem estis sieĝata kaj parte detruata, kaj la posedaĵoj valoris nenion plu. Perdis do la aĉetintoj de la unuaj kristanoj, kaj tiuj kiuj konservis siajn bienojn. Sed, tion ili ne povis antaŭvidi.

Oni tamen devas ankaŭ konsideri tiun sintenon ankaŭ kiel konsekvencon de la nova fido. Ĝi aperas kiel spontanea esprimo de la amo ricevita. Kiel aperas en la du mencioj de la 2-a kaj de la 4-a ĉapitroj, tiu divido inter la disĉiploj estas parto de ilia nova spirita vivo.

Jen kiel resumas la versiklo 42 de la 2-a ĉapitro, kaj kiun ni kantas: *Kaj ili firme persistis en apostol-instruo, kaj en kunuleco kaj en preĝ' kaj en divido de unu pan'*. Vi trovos tiun kanton en Adoru, numero 568, en teksto de Adolf Burkhardt. Tiu komuneco estis parto de la vivo de la unua komunumo. Solidareco, divido, amo estis ecoj de tiu komunumo, kiu arigis homojn de tre diversaj sociaj kondiĉoj. Kelkaj havis mankon, kaj aliaj havis posedaĵojn. En tiu unua eklezio estis malriĉaj kaj riĉaj, kaj tio ne malhelpis

la komunan vivon, eĉ inverse permesis tiun dividon. La ricevitaj savo kaj spirito kondukis al tiu konduto.

Tamen, tiu sinteno kaj alvoko ne estas novaĵo en la Biblio. Tion oni trovas en multaj tekstoj. Mi citos kelkajn kaj faros komentojn.

**Psalmo 82:**

*Ĝis kiam vi juĝos maljuste, Kaj privilegios la personojn de malvirtuloj? Estu justaj al malriĉulo kaj orfo; Rilate afliktiton kaj senhavulon estu virtaj. Liberigu malriĉulon kaj mizerulon; El la mano de malvirtulo ilin savu. Ili ne scias kaj ne komprenas, En mallumo ili marŝas.*

**Jesaja 58:**

*Ja nur tio estas fasto, kiu plaĉas al Mi, se vi disŝiros la ligilojn de malpieco, disbatos la katenojn de sklaveco, liberigos la prematojn, disbatos ĉian jugon; se vi derompos vian panon por malsatulo kaj senhejmajn malriĉulojn enkondukos en vian domon; se, vidante nudulon, vi lin vestos, kaj antaŭ viaj samkarnuloj vi vin ne kaŝos.*

*Tiam via lumo ekbrilos kiel matenruĝo, kaj via saniĝo rapide progresos; via virto iros antaŭ vi; la gloro de la Eternulo gardos vin malantaŭe.*

*Tiam vi vokos, kaj la Eternulo respondos; vi krios, kaj Li diros:Jen Mi estas! Se vi forigos el inter vi premadon, montradon per fingro, kaj paroladon malbonan, kaj malfermos antaŭ malsatulo vian koron, kaj satigos suferantan animon, tiam via lumo brilos en mallumo kaj via krepusko estos kiel tagmezo;*

**Amos 5:**

*Ĉar Mi scias, kiel multaj estas viaj krimoj kaj kiel gravaj estas viaj pekoj:vi premas virtulon, vi prenas subaĉeton, vi forpuŝas malriĉulojn en la pordego. Mi malamas, Mi abomenas viajn festojn, kaj Mi ne flaras la oferojn de viaj solenaj tagoj.*

*Kiam vi alportas al Mi bruloferojn kaj viajn farunoferojn, Mi ne akceptas ilin, kaj viajn grasajn dankoferojn. Mi ne rigardas.*

*Forigu de Mi la bruon de viaj kantoj, la sonadon de viaj psalteroj Mi ne volas aŭskulti.*

*Sed justeco fluu kiel akvo, kaj vero kiel potenca torento.*

**Sen 31:**

*Malfermu vian buŝon por senvoĉulo, Por la defendo de ĉiuj forlasitaj.*

*Malfermu vian buŝon, por juĝi juste, Por defendi malriĉulon kaj senhavulon.*

**Sen 21:**

*Se iu ŝtopas sian orelon kontraŭ kriado de malriĉulo, Li ankaŭ vokos kaj ne estos aŭskultata.*

Kiam oni aŭdas tiujn ĉi kelkajn tekstojn el la Malnova Testamento, oni tuj konstatas ke la justeco kaj la helpo al malriĉuloj ne estas novaĵo de la Evangelio. Eĉ ĝi aperas kiel esenca en la mesaĝo de la profetoj, sed ankaŭ en la ceteraj tekstoj. Ekzemple, la teksto de Jesaja, kiu estas ofte uzata en reformita liturgio kiel teksto de la leĝo: disŝiru la ligilojn de malpieco,

disbatu la katenojn de sklaveco, liberigu la prematojn, disbatu ĉian jugon, ktp. Revolucia mesaĝo, ĉu ne? Kaj kelkaj aŭdacas aserti ke la juda kaj kristana religioj estas konservativaj.

Tamen homoj restas homoj.

Do venas la teksto de Amos: jen la krimoj kaj pekoj de la popolo: vi premas virtulon, vi forpuŝas malriĉulojn. Tiam ne havas sencon la festoj, la oferoj, la kantoj.

Aŭskultu ankaŭ tiun versiklon de la Sentencoj: anstataŭ malfermi vian buŝon por laŭdo, malfermu ĝin por la senvoĉulo, por defendi la forlasitajn kaj la malriĉulojn.

La justeco en la sociaj rilatoj estas ĉefa elemento en la mesaĝo de Dio al la hebrea popolo, kaj ankaŭ al la homaro.

Mi pli poste citos alian tekston el la profetoj, sed mi antaŭe komentos iomete la faman perikopon de la Bona Samariano, kiun mi ne relegos al vi.

Mi simple lasos al vi kelkajn demandojn, kiuj kondukos nin al ĝeneralaj rimarkoj.

Nune, kiuj estos tiuj, kiuj preterpasis la vunditon? Ne forgesu ke ili faris tion por bonaj kialoj, almenaŭ laŭ sia vidpunkto. Kiuj estus niaj nuntempaj bonaj kialoj por preterpasi kaj ne helpi?

La helpo de la Samariano estis grava. Li fakte savis la homon. Sed la postan horon, la postan tagon, kiam ne plu troviĝos iu Samariano sur la vojo por helpi al sekvanta vundito, kio okazos? Tio estis rimarko de Albert Schweitzer. Individua helpa agado, se ĝi estas bonvena, ĝi ne estas sufiĉa. Estas ankaŭ bezonata socia kaj politika agado, estas postulata justeco kaj helpo. Tio estas alvoko al etiko, al homa solidareco. Tion postulas realismo.

Tiel estas la kristana etiko.

Fakte kristanismon konsistigas kelkaj elementoj: fido al Dio kaj Jesuo, certe, espero ankaŭ certe, sed ankaŭ amo, kiel konsekvenco.

> Kaj kelkaj aŭdacas aserti ke la juda kaj kristana religioj estas konservativaj

En la jam cititaj perikopoj de la Agoj de la Apostoloj, tiu ĉi amo manifestiĝis ene de la komunumo, sed tiu postulo de amo, de justeco estas ankaŭ direktita al la aliaj homoj.

Kiel atesti pri la amo de Dio al la homoj, se la kristanoj ne amas la aliajn homojn, se ili ne kondutas al ili kun justeco kaj solidareco?

Kiam oni parolas pri la rilato al mono, al Mamono kiel diras la Evangelioj, oni povas pensi pri la parabolo de tiu riĉulo, kiu pro bonaj rikoltoj decidis konstrui novajn grenejojn, turojn por si mem, kaj kiu mortis baldaŭ. Mono estas rimedo, rimedo por vivi, kaj kiam ĝi mankas, la situacio estas terura, sed estas ankaŭ rimedo por helpi, por solidari, certe ne por akumuli.

La kristana etiko postulas diversnivelajn agadojn: personan, komunuman, lokan kaj soci-politikan.

Oni tamen devas kompreni, ke por kristano, tiu agado alportas nenion al si mem. Ĝi ne estas por ricevi ian rekom-

pencon, ian gratulon. La unua kialo estas la ricevita graco kaj amo de Dio. Ĉio venas el Dio. Helpo kaj solidareco ne celas alporti ion ajn al la helpanto, kvankam ĝi ofte alportas ĝojon. Sed tiu ĝojo venas el la ĝojo de la alia. Tiu solidareco estas ordono, postulas obeon, sed ne por io sed pro io, pro Dio, pro lia amo, pro lia graco, pro Jesuo Kristo.

La ĉefa kialo estas amo, amo al la homoj, kiu estas respondo al la ricevita amo de Dio, estas respegulo de la amo de Dio al la mondo, al la homoj.

Sed, oni konstatas ke ankaŭ ekster la religiaj rondoj solidareco disvolviĝas. Tie la homoj ne konscias pri la amo de Dio. Sed multaj ankaŭ konvikiĝis pri la neceso de justeco kaj solidareco.

> Individua helpa agado, se ĝi estas bonvena, ĝi ne estas sufiĉa. Estas ankaŭ bezonata socia kaj politika agado, estas postulata justeco kaj helpo

Fakte, la malegaleco aperas al multaj kiel skandalo, eĉ kiel danĝero, kiel armita horloĝa bombo, kiun oni nepre devas malarmi.

Estas homoj, kiuj ankaŭ konsideras la fratecon de la homaro, kaj kiuj malakceptas la socian situacion de la mondo.

Tiuj konstatoj, kaj ankaŭ la influo de premgrupoj, kondukis la registarojn de la mondo al starigo de plano por plibonigi la situacion de la planedo: la Jarmilaj Evoluigaj Celoj. Tiu decido okazis en NovJorko en 2000 dum UN-kunveno. Ili celas por 2015:

- *Elradikigi ekstreman malriĉecon kaj malsaton*
- *Atingi universalan elementan edukadon*
- *Antaŭenigi seksan egalecon kaj doni povon al virinoj*
- *Redukti la nombron de infanaj mortoj*
- *Plibonigi patrinan sanon*
- *Kontraŭbatali HIV/aidoson, malarion kaj aliajn malsanojn*
- *Certigi median daŭripovon*
- *Starigi tutmondan partnerecon por evoluigo*

Pli da detaloj vi povos trovi sur la reto.

Kristanaj eklezioj kaj organizoj decidis repreni la fadenon, kaj en la nomo de la Evangelio rememorigi la registarojn pri siaj decidoj kaj engaĝiĝoj. Ili alprenis la nomon Miĥa-Defio.

Tiu nomo venas de teksto, kiun mi legos kaj rapide komentos:

**Miĥa 6,8:**

*Estas dirite al vi, ho homo, kio estas bona kaj kion la Eternulo postulas de vi: nur agi juste, ami bonfarojn, kaj esti modesta antaŭ via Dio.*

En ĉi tiu ĉapitro, Dio plendas al la popolo pri ties konduto, rememorigas ilin pri siaj postuloj kaj avertas pri la konsekvencoj. La popolo forgesis kiu estas Dio, kaj kiel Li liberigis ĝin. La popolo fariĝis nedankema, trompema,

malpia, rabema. Venos tiam suferoj, militoj, malsatoj, simple pro la malobeo al la simplaj ordonoj de la centra versiklo 8: agu juste, amu bonfarojn kaj kondutu modeste antaŭ Dio.

Tiuj ordonoj povus esti la simpla regulo por ĉiu kristano, por ĉiu eklezio.

Tiuj kristanaj organizoj prenis tiun moton por rememorigi la registarojn pri siaj promesoj por 2015, sed ankaŭ por konsciigi la kristanojn kaj la ekleziojn pri siaj respondecoj rilate al la situacio de la mondo kaj de la homoj, inkluzive de la malriĉuloj.

Pli da informoj vi povos trovi en la reto en diversaj lingvoj. Demandu viajn eklezianjn respondeculojn, ĉu ili aŭdis pri tiu Miĥa-Defio. Instigu ilin partopreni en ĝi.

Estas planata por dimanĉo, la 10-an de oktobro, speciala tago por la eklezioj.

Ĉu finfine, en la Eklezio kaj en la mondo, neniu plu havos mankon, kiel estis en la unua kristana komunumo? Ni tamen strebu al tio, kaj uzu ĉiujn eblajn rimedojn.

Ĉu en tiu batalo, KELI havu sian parton? Kial ne? Ĉu sufiĉas ke unu membro havas sian batalon kontraŭ maljusteco al blinduloj? Ĉu sufiĉas ke aliaj silente en sia loko agas? Ĉu KELI alimaniere agu en sia nomo?

Tiun demandon mi lasas al ni ĉiuj.

Mi dankas pro via aŭskulto.

## IKUE-Kongreso 2010

Raporto de Ulrich Matthias

La 63-a Kongreso de IKUE okazis de la 27-a de junio ĝis la 3-a de julio 2010 en Parizo, en la benediktana monaĥinejo apud la Baziliko de la Sankta Koro. Pro limigitaj kapacitoj de la kongresejo, ĝin povis partopreni nur 80 homoj.

La kongreso estis jubilea, ĉar 100 jarojn antaŭe okazis en la sama urbo la 1-a Kongreso Internacia de Katolikoj Esperantistaj, kadre de kiu IKUE fondiĝis.

Al la programo apartenis interalie:

- Sanktaj Mesoj en diversaj lokoj (ekzemple en la kripto de la Baziliko de la Sankta Koro kaj en la Kapelo de la Mirakla Medalo)
- vizito de la Katolika Universitato, kie IKUE fondiĝis en 1910
- prelegoj (ekzemple pri Emile Peltier, kun rezultoj de novaj esploroj)
- ronda tablo pri la demando “Kion signifas esti katolika esperantisto?”, kadre de kiu menciiĝis ankaŭ aktualaj temoj kiel la skandaloj pri pedofilio.

# Raporto kun impresoj pri la ĉi-jara KELI-kongreso

Mats kaj Anna LANDFORS,SE

Inter la dua kaj la naŭa de aŭgusto okazis la ĉi-jara KELI-kongreso en Beregdaróc, hungara vilaĝo apud la limo al Ukrainio. La konferenca loko estis tre taŭga kaj enhavis ĉiujn necesaĵojn: loĝĉambroj, kuirejo, manĝosalono, kunvenejo, preĝejo kaj eĉ naĝejo.

KONGRESA TEMO

La kongresa temo estis: *"Inter ili neniu havis mankon"* (Agoj 4,34). Preskaŭ ĉiu tago komenciĝis per matenpreĝo kaj finiĝis per vesperpreĝo. Tiuj personoj kiuj gvidis la preĝojn ofte aludis la kongresan temon el diversaj aspektoj. Ĝin pritraktis diversmaniere ankaŭ kelkaj prelegantoj.

MUZIKAJ IMPRESOJ

Ĉiutage okazis kantado, bone gvidita de Norbert Südland kaj Karl Heinz Schaeffer.


En la preĝejo troviĝis du orgenoj: malnova harmoniumo (bedaŭrinde malfacile ludebla) kaj elektronika klavar-instrumento. En la kunvenejo troviĝis elektronika orgeno. La du laste menciitajn instrumentojn nia muzikgvidanto Norbert Südland kaj mi sukcesis kontentige ludi. Dum muzika vespero ni povis aŭskulti altvaloran hungaran popolmuzikon, kiun ludis lerta muzikistino sur rara citro-instrumento. Same altvaloran ciganan (romaan) muzikon oni povis aŭskulti vendrede kaj sabate dum vilaĝa festo en la proksimeco. Dimanĉe post la hungarlingva diservo en la preĝejo okazis surpriza koncerto por violonĉelo kaj gitaro.

KONGRESA PROGRAMO

**Lunde**: La kongreso komenciĝis per interkona vespero, kiu montris ke ni estis proksimume 40 gekongresanoj el 11 landoj: Aŭstrio, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hungario, Madagaskaro, Nederlando, Rumanio, Rusio, Svedio kaj Svislando.

**Marde**: Matene havis lokon la oficiala inaŭguro de la sesdeka KELI-kongreso, kiun gvidis nia prezidanto Philippe








Norbert Südland kaj Karl Heinz Schaeffer



Éva Farkas-Tatár



Ed Borsboom




Hanna Cayzac

Cousson. Oni peris salutojn de kelkaj kelianoj, kiuj pro malsanoj aŭ aliaj obstakloj ne povis ĉeesti, kaj ankaŭ salutojn de aliaj personoj. Du ĉeestantaj pastoroj, kiuj reprezentis lokajn reformitan kaj grekkatolikan ekleziojn, salutis la kongreson.

Poste sekvis la unua prelego pri la kongresa temo fare de Jacques Tuinder, kiun Siegfreid Krüger laŭtlegis. (Ĉar Jacques bedaŭrinde pro malsano ne povis ĉeesti.) Pri la kongresa temo prelegis ankaŭ Philippe Cousson. Posttagmeze Eva Farkas prezentis kelkajn vidpunktojn rilate al la kongrestemo kaj rakontis memorindaĵojn pri la KELI-kongreso en Debrecen 1966, kiun ŝi organizis. Poste Siegfried Krüger prelegis pri Albrecht Dürer kaj Philip Melanchton. Vespere oni montris hungaran filmon pri la jaroj 1946 & 1947 pri grupo da infanoj, kiuj dum la milito perdis siajn gepatrojn.

**Merkrede** antaŭtagmeze: Bengt Olof Åradsson prelegis pri la dana filozofo kaj teologo Sören Kierkegaard. Poste Ed Borsboom parolis pri Andreo Cseh kaj lia instrumetodo. Posttagmeze Norbert Südland prelegis pri ekleziaj tonaloj. Pavel Polnický raportis pri ekumenismo komence de la tria jarmilo. Hanna Cayzac parolis pri la interna kruco kiel simbolo de senmankeco. Vespere ni havis la programon kun hungara citromuziko.

**Jaŭde** okazis tuttaga ekskurso al unikaĵoj. Ni vizitis tri vilaĝojn kun tri diversstilaj preĝejoj: popola baroka, nobela baroka kaj urba baroka stilo. Ni vizitis tombejon kun lignaj anstataŭ ŝtonaj monumentoj. La tombolignâĵoj havis boat-formon kaj estis parte dekoritaj. Ni ankaŭ vizitis du malnovajn muelejojn. Estis akvomuelilo kaj muelilo tirita de ĉevaloj. Vespere ni povis lerni manlaboron en formo de flor-farado.

**Vendrede** antaŭtagmeze: Siegfried Krüger prelegis pri Charles Darwin kaj la malfacila heredaĵo por la kredo. Ed Borsboom parolis pri Henk de Hoog. Szabolcs Birta prezentis vidpunktojn de la rumana reformita eklezio pri transdono de organoj. Post la tagmanĝo ni havis vivan diskutadon pri la teorioj de Darwin. Poste Norbert Südland daŭrigis la prezentadon pri la ekleziaj tonaloj. Karl Heinz Schaeffer montris bildojn kaj rakontis pri la ĉi-jara UK en Kubo. Vespere Ágnes Ráczkevy-Eötvös montris bildojn kaj rakontis pri Vang, malnova norvega preĝejo el ligno, kiun oni vendis al pola luterana eklezio kaj translokigis al Pollando.



Pavel Polnický

**Sabate**: Ni havis la tradician jarkunvenon. Posttagmeze okazis duontaga ekskurso: Transmarĉa veturado per ĉaroj tiritaj de ĉevaloj. La nokton antaŭ la ekskurso falis multe da pluvo kaj la marĉaj vojoj fariĝis malfacile vetureblaj, kaj oni devis ŝanĝi la veturordon. Kelkfoje oni havis la senton ke la ĉaro estus povinta renversiĝi. Sed Dio gardis homojn, ĉevalojn kaj ĉarojn, kaj ni bone revenis al nia kongresejo. Vespere ni povis partopreni nuptan feston, kiun oni havis parte en la kongresejo. La geedziĝa paro de la vilaĝo ofertis al ni gekongresanoj ĉampanon, se ni tion deziris; kaj ni povis partopreni la dancadon kaj aŭskulti modernan hungaran dancmuzikon.



Szabolcs Birta

**Dimanĉe** estis du diservoj en la preĝejo, unu en hungara lingvo kaj poste nia diservo Esperanta kun sankta manĝo. Philippe Cousson predikis. Posttagmeze Viktor Gromov rakontis pri la vivo de sia malgranda kristana komunumo en sia regiono Norda Kaŭkazio en suda Ruslando. Vespere okazis la tradicia adiaŭa vespero kun muziko, ludoj, ŝercoj k.t.p., kiun lerte gvidis Samuel Gaillard. Matene la naŭan de aŭgusto



Viktor Gromov

la kongreso fermiĝis, kaj ni ĉiuj hejmenvojaĝis kun multaj interesaj, bonaj kaj belaj impresoj.

FINAJ RIMARKOJ
(Mia edzino Anna volas aldoni kelkajn personajn impresojn.)

Estis multaj prelegoj, kaj mi aŭskultis preskaŭ ĉiujn. Kelkaj estis iomete tro ”altaj” por mi. Unu prelego kiu parolis al mia koro estis tiu de Eva Farkas pri la la kongresa temo: Mankoj hodiaŭ povas esti oreloj kiuj aŭskultas. Homoj bezonas iun, kiu interesiĝas pri ili; telefonvokas, vizitas k.t.p.

Mi tre ŝatis la kantadon, plej multe tiujn kantojn, kiujn ni povis kanti plurvoĉe. Inter alie ni kantis tre belan kaj profundan kanton, kiun verkis Albrecht Kronenberger. Dankon pro tiu kanto!

Eble la plej agrabla en tiu bela kongresloko estas la naĝejo, kiun mi uzis por naĝado multfoje pro la varma vetero.

Mi partoprenis ankaŭ la manlaboron, kaj kun iu helpo de la gvidantino mi faris kelkajn belajn florojn, kiuj nun estas en vazo kiel memoraĵo. Tio ĝojigis min, ke kelkaj junaj virinoj partoprenis nian kongreson. Ni deziras al ili bonan daŭrigon. Ni kun granda ĝojo memoras la semajnon en Beregdaróc kaj volas tutkore danki la organizantojn.

ꕥ

Mallongigoj pri fotistoj:
KHS: Karl Heinz Schaeffer
WvG: Wil van Ganswijk-Vlasblom

Foton sen indiko fotis la redaktoro.



Wil van Ganswijk-Vlasblom manlaboras



Ruth von Puijenbroek notas en sia taglibro



Lajos Kobor kaj Maria Laszlo



Hedwig Schaeffer, Viktor Gromov, Mila Hodushova
Fotis KHS



Estrar-
kunsido



Monika Stroinski kaj Anna Landfors



Grupo ripozas inter programeroj



Grupo dum la marĉa ekskurso Fotis WvG

# Ŝercoj kolektitaj (4)

MU Binghua, Ĉinio

- **Viro: ”Mi promesas** plenumi vian ajnan peton. Sed antaŭ ĉio mi petas vin konsenti pri mia sola peto.” La virino: “Bonvolu diri, kia peto?” La viro: “Ĉiam ne al mi metu iun peton”

- **La junulo estis hontemulo**. Tial kiam lia patrino eksciis, ke li iros por svati, ŝi estis tre surprizita. En unu horo li faris plenan pretecon kaj kun radiaj okuloj eliris. Sed nur post duonhoro li revenis. La patrino demandis: “Kiel iris la afero?” “Tre bone!” respondis la junulo. “Ĉu vi ŝin vidis?” “Nature mi ŝin vidis. Sed se mi ne estus kaŝinta min malantaŭ la plektbarilo, do, ankaŭ ŝi povus vidi min.”

- **Iu estas famkonata.** Unu junulo tamen tion neas. “Kial?” oni lin demandas.“ Kiam lastfoje mi renkontiĝis kun li, se mia akompananto ne konigus lin al mi, mi tute ne scius, kiel li nomiĝas.”

- **Junulo sukcesis fabriki** tian kuirfornon, kiu uzis energion el la suno. Alia junulo diris: “Ankaŭ mi povas tion fari. Ne nur tion, mi intencas ankoraŭ alflugi la sunon por preni fajron.” Tiam unu el la aŭskultantoj faris la demandon: “Sed, ĉu tien, kie estas varmege vi kapablas atingi?” “Vi estas malsaĝa! Ĉu mi ne en nuba tago flugos al ĝi?”

- **Dum la kantistino ekzercis** sin en kantado, forte bojis kaj bojadis hundoj de la najbaro. La kantistino: “Sinjoro, ĉu vi ne povas lasi viajn hundojn ne boji?” “Nur tiam, kiam vi ĉesigos vian kantadon, estos certe, ke ili ne plu bojas.”

- **Junulino Hong serioze diris** al sia amikino Zhen: “Vi faris la eraron rifuzi junulon Wang, kiu foje petis vian manon, nun li kaj mi jam geedziĝis.” Zhen pledis: “Pri tio mi neniam bedaŭris. Kiam mi lin rifuzis, li diris al mi, ke pro la rifuzo li faros tre malsaĝan decidon.”

- **Paro de geedzoj** aprecis belartaĵojn en la galerio. La edzino staris antaŭ la virina portreto, mire dirante al la edzo: “Vidu, tiu ĉi estas la plej malbela virino, vidita de mi.” La edzo tuj murmuris al ŝi: “Atente rigardu! Ĝi ne estas bildo, sed spegulo.”

- **Fiŝeto plendas** al sia patrino pri manko de kolringo. Tre maltrankviliĝas la fiŝa panjo kaj kontraŭargumentas: "Kial postuli? Ĉu ne estas granda la instrua leciono de via fratino? Ŝi persistis en postulo de orelringo, kia rezulto? Fine ŝi estis hokita de fiŝisto."

- **En aŭtobuso viro rimarkas**, ke iu intencas ŝteli lian monujon. Li sprite montras la poŝon, kie kuŝas lia akto pri ofico, kaj diras: Ĝenu vin, aldone, eligi ankaŭ tiun ĉi!" "Kial?" "Ĉar per ĝi mi pruvos, ke mi estas policano."

- **Kliento: "Kiom da mono kostas** tiu paro da okulvitroj"? Vendisto: "Ĉe ĝi la prezo ja estas skribita." Kliento: "Sed pro miopo mi ne povas klare ĝin vidi." Vendisto: "Ne gravas! Aĉetu paron kaj per ĝi vi povos vidi."

Aldone en sia letero, kiun nia frato Mu Binghua sendis al la redaktoro, li raportas pri la situacio en sia lando. Ankaŭ en Ĉinio la ekonomia krizo kaŭzas personajn krizojn. Li skribas inter alie: "Ĉar la ekonomia krizo daŭre restas en nia lando. Multaj familioj havas pli malaltan enspezon ol en la pasinta jaro. ... [Multaj] malfacile vivtenas sia[j]n familio[j]n. ... Nuntempe mi portempe havas salajran laboron en privata lernejo. Mi instruas al unu klaso (ĉirkaŭ 50 geknaboj) matematikon."

## Dia Regno menciita en la Agoj 1,1-5

Mian unuan libron, ho Di-amanto, mi verkis pri ĉio, kion ekde la komenco Jesuo faris kaj instruis ĝis la tago, kiam li leviĝis [en la ĉielon], post kiam per sankta spirito siajn instruojn li donis al la apostoloj. Al ili dum kvardek tagoj li pruvis ripete, ke post sia suferado li vivas. Li montris sin al ili kaj parolis pri la Regno de Dio. Estante ĉe ili, li insistis, ke ili ne foriru de Jerusalem: Atendu, kion promesis la Patro kaj kion vi aŭdis de mi; ĉar Johano ja baptis per akvo, sed vi estos baptitaj per sankta spirito post malmulte da tagoj.

Laŭ la traduko de Gerrit Berveling. (Flanke de Jesuo. La Nova Testamento. vol.3)

# Recenzo pri "Konversacia Vortaro" de Andreo Cseh

Laste mi aĉetis malgrandan libron dum la KELI-kongreso 2010 en Beregdaróc/Hungarujo. Estas eldono de Internacia Esperanto-Instituto en Hago sub la redakto de Ed Borsboom kiel 6-a eldono 2010 kaj portas la titolon "Konversacia Vortaro***Andreo Cseh". Sur 111 paĝoj oni povas legi ne nur la 479 originajn vortojn, kiujn Andreo Cseh en 1930 publikigis, sed ankaŭ pliajn 134 vortojn kun spritaj difinoj, kiujn lernantoj de Ĉe-kursoj dum la lastaj jaroj enkondukis.

Kun pli kaj pli granda intereso mi trastudis la klarigojn, kiuj ofte rezultis al granda interna rido por mi. Ekzemple oni povas legi sub:
*azeno* = besto kun forta karaktero aŭ
*fantazio* = fabriko de belaj bildoj en la kapo.
Tiamaniere oni povas sur ĉiu dekstra paĝo malkovri nekutimajn formuladojn.

Sur la aliaj maldekstraj paĝoj troviĝas desegnaĵoj de la artisto Jesse van Dijl, kiuj montras scenojn en la spirito de la Ĉe- instruado, referencantaj al unu de la difinoj el la dekstra flanko de la libro.

Oni devas laŭdi la eldonejon por la nova apero, kiu facile donas multajn novajn facetojn, pliriĉigi la Esperanto-kursojn, ĉu nacilingvajn ĉu Ĉe-metodajn, ĉar oni ne tuj trovas mem solvon. Kio estas ekzemple balono? Sed en la vortaro la aŭtoro ankaŭ malkaŝas tion: *balono* = aero kun haŭto!

Do la prezo de 13 euroj valoras por la broŝurita verketo, havebla ĉe Internacia Esperanto-Instituto en Hago aŭ ĉe ĉiu bona libroservo en Esperantujo.

*Karl Heinz Schaeffer*

*__Kara redaktoro__, antaŭ la ferioj mi legis en la gazeto de nia protestanta groningena eklezio peton, sendi al ĝi impreson pri la ferioj en nur 200 vortoj. Oni petis ankaŭ foton. La tri plej interesajn oni publikigos. Lastvendrede venis la gazeto kaj tuj mi rigardis, ĉu mia raporto estas en ĝi.*

*Jes! Kiel unua ĝi estis sur unu el la paĝoj. Por vi mi tradukis mian tekston en Esperanton.*

*Eble ĝi taŭgas ankaŭ por Dia Regno.*




De maldekstre: Zsuzsanna Tóth (HU), János Weisz (RO), Wil van Ganswijk-Vlasblom (NL), Hoby Andrianirina (FR/Madagaskaro)

# Kristana ferisemajno

Komence de aŭgusto mi partoprenis en sukcesplena kristana feria semajno. Estas bedaŭrinde, ke mi ne povas dividi miajn spertojn kun legantoj de 'KERK IN STAD' – la gazeto de la groningenaj protestantaj eklezioj –. Mi nome estis la nura partoprenanto el Groningen. Kie mi estas estinta?

En Beregdaroc, vilaĝo en la oriento de Hungario, proksime de la ukraina landlimo. Tie troviĝas nova konferencejo kun naĝejo. Tien ni vojaĝis, 40 personoj el 11 diversaj landoj, diversaĝaj, anoj de diversaj eklezioj. Ni ĉiuj parolis la saman lingvon, Esperanto, kaj interakordiĝis ankaŭ spirite, tio ja pruvas la partopreno de multaj el ni en la sankta manĝo dum la dimanĉa diservo.

Kiel vortigi la etoson de la semajno en 200 vortoj? Estis prelegoj pri la kongrestemo: Agoj 4, versiklo 34a, pri Dürer, Melanchton, Kierkegaard, Andreo Cseh, Darwin. Ni vidis kortuŝigan filmon, aŭskultis orgenludon de blinda sveda orgenisto, citromuzikon de hungarino, vestita en regiona kostumo. En ĉaro kun du ĉevaloj ni estis fiksitaj en la koto survoje al marĉo. Ni kantis el internacia kantlibro kun Esperanto-eklezimuziko kaj naĝis dum ĉiuj liberaj momentoj. Post sukcesplena adiaŭa vespero kun teatraĵo, ludo kaj muziko, ni adiaŭis unu la aliajn. “Ĝis revido, sekvontjare en Podebrady en Ĉeĥio!”

*Wil van Ganswijk-Vlasblom*

# VIVI KUN KRISTO

Jesuo iris surtere
kun kelkaj disĉiploj kun si.
Li havis mesaĝon por ĉiuj:
”Vin turnu kaj venu al mi!”

Instruis li homojn jene:
”Trezorojn ne havu por vi,
sed donu al kunirantoj
kaj estu benataj de mi.

Malfermu la koron por amo,
la amo de Dio al vi,
kaj donu ĝin plu en la mondon,
ne nur al amikoj de vi!”

Kelkfoje amasoj lin sekvis;
(”hosana!” sonis la kri’)
sed poste ne havis la forton
daŭrigi la vojon kun li.

La vojo de li malfacila!
Li mortis sur kruco por ni,
sed venkis kontraŭ morto.
Jesuo vivas kun Di’.

Venis la Sankta Spirito
sendita kun helpo de li.
La eta rondo kristana
kreskis nun pli kaj pli.

En la komenco la anoj
nenion posedis por si,
sed la gefratoj ĉion
disdonis en harmoni’.

En la rondo neniu kun manko;
ĉiu persono en ĝi
Konforme al sia bezono
ricevis la panon por si.

Kristanoj milione nun vivas
kun komisio de Di’:
”Kion vi deziras de iu,
faru la saman al li!”

Ĉu ni bezonas la multon
aĉetitan facile de ni,
se la laboro pro tio
estas danĝera por li,

kiu faras tiujn produktojn
malmultekostajn por ni,
sed preskaŭ ne havas manĝon
por si kaj la famili’?

Multaj de niaj gefratoj
mankon havas por si,
bezonas do nian apogon
por justeco pli kaj pli.

Anna Landfors, SE